
FN PER ANC 47

N° 235 NOVEMBRO 2008

# NORMANDA ESPERANTO BULTENO

# ESPERANTO - NORMANDIE

Redaktas :Pierre Lemarchand, 2 les Terres Quemines 76113 Hautot sur Seine. Tel. 02 35 34 28 78
LEMARCHANDPI@wanadoo.fr
Abon-kotizoj : 8 Eŭroj . Esperanto - Normandie. C.C.P. 283.40.H Rouen.



Diskutado dum la maja Ĝenerala Kunveno

Dimanĉa tagmanĝo en la gastejo « La Chaumière »



## Ni kunvenis en Betteville (76 -Seine Maritime)

*Tiun bultenon vi ricevas kun granda malfruo , interalie pro du enhospital-igoj, operacio kaj tri semajnoj poste, hemoragio de mia edzino Maryse.*

*Nun, denove hejme, ŝi nuntempe pli bone fartas, tio permesis al mi retrovi iom da libera tempo por eldoni tiun bultenon.*

*Mi petas senkulpigon. Bonvolu pardoni min pro tiu malfruo.*

Pierre Lemarchand.

## *En tiu numero :*


| | |
|---|---|
| Impresoj pri Ĝenerala | 2 |
| Fotoj Ĝenerala kunveno. | 3 |
| Eŭropaj Elektoj. | 4 |
| Aforismoj + p. 6 | 4 |
| Zamenhofa festo ĉe UNESKO en Parizo. | 5 |
| Spertoplena Generacio | 5 |
| Mediteranea E° Semajno | 6 |

# IMPRESOJ PRI NIA ĜENERALA KUNVENO

Miaj impresoj estas ankoraŭ freŝaj kaj mi ne volas atendi por sciigi al vi tion kio okazis dum nia regiona kunveno.

Unue mi riproĉos al nepartoprenintoj ilian foreston. Betteville kaj ties gastejo « La Chaumière » estas tre agrabla vilaĝo,meze de belega naturo tipa en « Pays de Caux ». En la gastejo, regis simpatia etoso ; estas domaĝe ke nur malmultaj samideanoj profitis tiun turisman lokon kie ni pasigis agrablan semajnfinon bone manĝante dank'al bona organizado farita de Pierre kaj Maryse. Sabate vespere, ni ankaŭ ĝuis belegajn vidaĵojn dank'al filmo pri Japanio dum periodo de ĉeriza florado. Tiu filmo kun multkoloraj floroj estis artiste farita de Gigi kaj Gérard Sénécal okaze de vojaĝo dum kiu ili uzis la servojn de « Pasporta Servo » loĝante ĉe diversaj esperantistaj samideanoj.

Ĝenerala kunveno ne estas kongreso kun multaj partoprenantoj. Tamen ni bedaŭras ke tiom malmulte da membroj de nia regiona asocio interesiĝis pri niaj debatoj kaj pri la estonto de Esperanto-Normandie. Tiu seninteresiĝo sendube estas la kaŭzo de stagnado de nia lingvo.

Partoprenis la kunvenon delegitoj de Manche, Calvados, Eure kaj Seine Maritime.

Post debatoj, agadraporto kaj financa raporto estis unuanime aprobitaj. Financan raporton vi povos legi en tiu-ĉi ligilo, (*venontnumere*). Vi konstatos ke « Normanda Bulteno » estas ĉefa elspezo pro tio ke aliaj aktivaĵoj ne ekzistis ! Kion fari por pliaktivigi nian asocion ? Iuj faris la demandon « ĉu regiona asocio estas utila ? ĉu ni devas ĝin daŭrigi ? Aliaj demandis « kial najbaraj regionoj (Nordo , Bretonio) estas pli aktivaj ? « Normanda Bulteno » pli bele aspektas depost ŝanĝo de redaktoro sed ĉu necesas ĝin aperigi kvarfoje en la jaro ?

Al tiuj demandoj, ni respondis kaj decidis ke nia asocio daŭros , eĉ letargie sed ke aktivuloj devos rezervi sian energion por aktivaĵoj en lokaj grupoj, kiuj estas la kernoj de nia movado.

Ni decidis daŭre aperigi la bultenon , ĝin presi kaj sendi perpoŝte sed ankaŭ ĝin sendi perrete al tiuj kiuj havas komputeron kaj sendos al ni sian retadreson. Tiel , ni povos rapide perrete disponigi informojn al grupoj kaj izoluloj. Ankaŭ, blogo estos malfermata.

Ni decidis profiti okazontaĵojn organizotajn de najbaraj regionoj, anoncante ilin kaj instigante niajn membrojn ilin partopreni (renkontiĝoj, staĝoj, interfederaciaj kongresoj ktp...)

Ni rekontaktos « Esperanto-France » por subskribi kontrakton kiu kontribuos al disvastigo de Esperanto. Kompreneble tio ne ĝenos tiujn kiuj ne volas esti membro de U.F.E. kaj estas anoj de aliaj asocioj.

Nia amiko Sébastien delonge informis nin ke li ne plu volas resti prezidanto pro profesiaj taskoj kaj pro teatraj aktivaĵoj. Ni dankis lin pro lia provizora prezidanteco kaj ni elektis novan estraron kiu konsistas el :

Prezidanto : Yves Nicolas

Kasisto : Pierre Lemarchand

Sekretario : Pierre Quillaud

Krome, Pierre Lemarchand estos bultenisto kaj Pierre Jouvin kontkontrolisto.

Prefektejon de Seine Maritime ni informos pri tiuj ŝanĝoj

***Petro KIJO***



Niaj geamikoj Rémy kaj Nicole **LEBRUN** invitas vin viziti aŭ kontakti ilin :

***LEBRUN Sarl,***

Antikvaĵoj,
Brokantaĵoj,
Poŝtkartoj :


58 route des Andelys, **27510 Pressagny l'Orgueilleux.**
Tél : 02 32 51 30 16.

www.pressagny-brocante.com

Vi povas trovi ĉe ili multajn malnovajn librojn, broŝurojn revuojn, poŝtkartojn en **Esperanto.**



Debatoj, eĉ dum kafo-paŭzo !



Nia amiko CHALM deklamas



Nia eks-prezidanto Sébastien ERHARD



Dimanĉa tagmanĝo



Ĝenerala Kunveno



Nia gastejo :

« La Chaumière » de Betteville (76)

# ELECTIONS EUROPEENNES

Dans quelques mois, vous serez appelés pour envoyer des députés au Parlement Européen.

En 2004, certains espérantistes ont voulu profiter des élections européennes pour traiter du problème de la langue commune pour l'Europe. Ainsi a été constituée l'association « Europe Démocratie Esperanto » qui a présenté des listes en France ; il y avait une liste pour la région Nord/Normandie. J'étais moi-même candidat.

Bien entendu, les organisations traditionnelles du mouvement esperantiste ( UEA, Esperanto-France, SAT, SAT-Amikaro, Esperanto-Normandie, etc...) ne pouvaient pas s'impliquer dans une telle action contraire à leurs statuts. D'autre part, bien des espérantistes voulaient rester fidèles au parti pour lequel ils votaient traditionnellement et ne voulaient pas « perdre » leur bulletin de vote.

Grâce à cette action, des millions de personnes ont découvert l'existence de l'Esperanto : les spots de la télévision étaient bien faits ; des articles, des interview, des affiches ont permis d'informer des gens que nous n'avions pas réussi pas à toucher auparavant.

Quant aux résultats électoraux, ils ont été proportionnels au militantisme et surtout aux ressources financières dont nous disposions. Il n'a été possible de faire imprimer que 200 000 bulletins de vote (80 000 pour le Calvados, 120 000 pour la Seine Maritime et aucun bulletin pour les 3 autres départements.) Alors que pour la Seine Maritime seule, il aurait fallu plus de 2 millions de bulletins !!! Dans la plupart des bureaux de vote, on ne pouvait trouver aucun bulletin : il fallait fabriquer soi-même son bulletin , grâce à Internet.

Fort de l'expérience passée, « Europe Démocratie Esperanto » compte bien être présent à cette élection pour y dire combien il est urgent que les Européens puissent se comprendre, s'organiser et faire entendre leur voix, pour y dire qu'utiliser l'Esperanto comme langue de débat en Europe, c'est y rendre possible la démocratie en permettant l'échange direct entre les peuples et les citoyens européens.

Dans nos régions, Nord-Picardie + Haute et Basse Normandie, EDE a besoin de militants pour être sur les listes de candidats, pour distribuer des tracts, organiser des réunions publiques, coller des affiches, collecter des dons pour faire imprimer bulletins et professions de foi.

Ayant décidé de cesser mes activités et de prendre ma « retraite espérantiste », je passe le flambeau . Je soutiendrai l'action d'EDE mais je n'aurai plus de rôle actif. J'appelle donc tous ceux qui sont intéressés à contacter le plus tôt possible le Président-Délégué de la circonscription Nord/Nord-Ouest :

Marc ANSELMI

1 rue aux Foulons, Appt 5, 62000 ARRAS

Courriel : manselmi@esperanto-nord.org

Bien amicalement ***Petro KIJO***

---

## AFORISMOJ

***De SENEKO :***

- Bona uzado de tempo konsolas pri ĝia forpaso.
- La okaza enhavena sinkado de ŝipo ne devas forgesigi la pli oftajn enmarajn ŝippereojn
- Ne komencu vivi kiam tempas ĉesi; ne ĉesu sen esti komencinta.
- Ĉio forpasas, sed revenas, kiel nokto kaj taglumo.
- Konscio pri sia kulpo estas komenco de pliboniĝo.
- Samkiel pri virino, juĝo pri eminentulo validas nur ĉion vidante.
- La manoj plej taŭgaj por glavo iam tenis plugilon.
- Velurselo kaj arĝentmordaĵo ne faras bonan ĉevalon.
- Dum belvetero ĉiu pilotpovas.
- Estas sendankemo danki forĉeeste de atestantoj

Elektitaj de : ***Henri ROUSSEAU***

## Zamenhof-festo en Unesko la 15-an de decembro 2008

Iniciate de la pola delegitaro ĉe Unesko, subtenata de la litova delegitaro, kaj en kunlaboro kun Universala Esperanto-Asocio, la 15-an de decembro 2008 okazos en la sidejo de Unesko en Parizo solenaĵo por celebri la naskiĝon de Lazaro Ludoviko Zamenhof. Samtempe ĝi estos bela enkonduko al la jaro 2009-a, la 150-a datreveno de la naskiĝo de Zamenhof.

Dum la festo estos pluraj oficialaj salutoj de la ambasadoroj kaj de reprezentantoj de Unesko kaj sekvos poste paroladoj, spektado de filmeto pri Esperanto kaj bufedo. La ĉefaj paroladoj estos tiuj de la franca lingvistino Henriette Walter kaj de la nepo de Zamenhof, Louis Zaleski-Zamenhof.

La tuto en solena etoso okazos de la 17,30 ĝis la 20,30 en la sidejo de Unesko en Parizo.

Ĉiuj esperantistoj estas varme invitataj partopreni. Por eniri la sidejon de Unesko vi devos esti en listo antaŭliverota al Unesko. Por esti en tiu listo, se vi pretas partopreni, bonvolu tuj sendi al la ret-adreso <zamenhoffesto.unesko@gmail.com> vian personan nomon, familian nomon,..............

Venu, ni deziras montri al Unesko kiom da ŝatantoj de la lingvo de Zamenhof estas en la proksimeco de Parizo.

## Retrospektivo al spertoplena generacio.

Havra klubo denove estis trafita de malfeliĉo. Amikino **Christiane HUET** forpasis subite la 19an de oktobro, unu jaron post **Maurice** (aŭgusto 2007).

Aŭdiaŭa kunveno okazis kun ĉeesto de intimuloj kaj de Havraj samideanoj.

Same kiel Maurice, ŝi fervoris tiel sincere en nia Movado, kiel en siaj personaj engaĝiĝoj. Ŝi partoprenis multajn esperantistajn renkontiĝojn kaj spertis Jubilean Kongreson en Varsovio (1987).

Nia klubo havis belan memortransdonintaron Ni memoru pri *Jean Gibaux*, prezidinto de H.E.G., *Christiane* kaj *Maurice* kiui kunagadis por pluantaŭenirado de nia pionira Asocio. Liaflanke *Paul Mary* (forpasinta en septembro 2007, pasiiĝis por Esperanto dank'al instigo de samideano *Georges Kersaudy*.

Ili ĉiuj estis influitaj de eminentaj okazaĵoj (veno de *Lidja Zamenhof*) aŭ vivado de malhelaj tempoj de milito. Ili emis al pli bona interkompreno inter popoloj. Ilia entuziasmo venis de sinteno de privilegiaj engaĝiĝantoj.

Ni inspiriĝu de ilia sperto, por plej bone atesti.

***Sylvie CARON***






Poŝtmarko el Svislando.

64a Universala Kongreso de Esperanto.

Februaro 1979.

## Tria listo de kotizintoj por 2008

Rigardu ĉu via nomo estas en ĉi-suba **TRIA** listo : Ge-Sinjoroj :

*JOURDAINE*, LEMELTIER, *ROUSSEAU*, ROUSSEAU-PELLICO.


## Unua listo de kotizintoj por 2009

**UNUA** listo : Ge-Sinjoroj :

*CARON*, CHALM, *DUFEU*, DUFRESNE, *ERHARD*, LEMARCHAND, *NARDIN*.

Faru vian ĉekon profite de **ESPERANTO-NORMANDIE CCP 283 40 H ROUEN**
**Abon-kotizo por 2008 aŭ por 2009 : 8 Eŭroj**, kaj sendu ĝin al la kasisto :

Pierre Lemarchand, 2 Résidence Les Terres Quemines. 76113 Hautot sur Seine.



## *MEDITERANEA ESPERANTO-SEMAJNO*

**28-a februaro ĝis 7a marto 2009**

**AGAY St RAPHAËL**

*Francio - Lazura Marbordo.*

Se ankoraŭ frostas en via regiono venu al la Mediteranea Maro, kie floras mimozoj kaj migdalarboj. Vin atendas amika, familia etoso, belegaj pejzaĝoj, bona ripozo kaj lazura maro !!!

Vi povos plibonigi vian nivelon de Esperanto en trigradaj kursoj. Posttagmeze, vi mem elektos vian programon : promenado, piedirado en montaro Esterel, familia vivo ĝis la vespero. Distraĵôj. La studejo estas komforta hotelo « Le Renouveau » en Agay (ĉe Saint-Raphaël).

*Informoj kaj Aliĝoj ĉe :*

Christine Graissaguel, Résidence les Iles d'Or B1, rue du Progrès, FR 83600 Fréjus. Francio.
Tel : 04 94 95 66 18

## *AFORISMOJ*

***Kelkaj aliaj :***

- Febluloj havas problemojn, fortuloj solvojn.
- Martelfrapoj rompas vitron, sed ŝtalon hardas. (*Puŝkin*).
- Al hundo kun mono, oni diras « hunda moŝto » (*Araba proverbo*).
- Necesas preferi utilan kritikon ol laŭdo kiu perfidas. (*La Rochefoucauld*).
- Kato kun gantoj maltrafas la musojn. (Angla proverbo).
- Ĉiu lando posedas armeon, se ĝi estas sia, estas tiu de okupanto.
- Ne necesas kapabli demeti ovon por rajti juĝi omleton. (*Jean Sendy*).
- Sen libereco mallaŭdi, nenia laŭdo povas kontentigi. (*Beaumarchais*).
- Sperto estas lanterno alkroĉita al dorso, ĝi lumigas la jam iritan vojon. (*Konfuceo*).

Elektitaj de : ***Henri Rousseau***




Poŝtmarko el SURINAMO.
Februaro 1987.
100 jaroj de Esperanto.